

Nova afiŝo !

4-kolora

Prix coûtant:
2 FRF !



Format de l'affiche : A2 (42 cm x 60 cm)

Personnalisation :
Espace blanc libre de format A5 (10,5 x 21 cm) pour coller une photocopie ou inscrire votre texte.

Exemples :

Tel : 01 42 78 68 86
ou
jefeo@esperanto.org

Stage d'initiation
à la langue internationale
espéranto les 8-9-10 mai
Club de l'Arverné
28 rue Desherbiers - Lyon 6ème
ENSEIGNEMENTS/INSCRIPTIONS : 04 78 43 67 04

Cours d'initiation
à la langue internationale
espéranto le jeudi à 20h
MJC Jean Duprand
13 rue de la République - Toulouse
ENSEIGNEMENTS/INSCRIPTIONS : 05 10 11 12 12

Ĝi alvenas iom malfrue sed ĝi ekzistas. Restas kelkaj tagoj por anonci la Universalan Kongreson en via kvartalo, urbo, vilaĝo. Tiu belkolora afiŝo kostas nur 2F (mendi ĉe SFS). Kaj post la kongreso, ĝi estos ankaŭ uzebla (sufiĉos eventuale fortranĉi la daton supre), restos libera loko por anonci kunvenon, prelegon, kurson... Por forumoj de asocioj, ĝi estos okulfrapa sur via budo.

angulo de la prezidanto

kio nova en Esperantio?

Mi legis la historion de nia federacio de 1955 ĝis 1975... Mi devas konfesi, ke nia movado ne prenis eĉ unu falton! ...

- la bonvolemluloj **estas raraj** kaj laboras multe ĝis la limo de la fortoj
- la gelernantoj **reziĝnas pri serioza studado** kaj rare trapasas ekzamenon
- la esperantistoj **krokodilas** dum la kunvenoj **aparte organizitaj por ekzerci sin al la parolado**
- la abonantoj **ne legas** la revuojn kaj **plendas ne esti informitaj** pri la diversaj aranĝoj
- la prezidanto alvokas la ĉielon, **por ke la izoluloj grupiĝu** ene de la federacio
- la kasisto petas, ke la prokrastantoj **rapide pagu** la jaran kotizon
- la redaktoro de "La Informilo" atendas pacience, **foje senespere**, presendajn artikolojn

.....nenio nova en Esperantio !

Fakte la ĉi-supra teksto, redaktita de F-X. Gilbert, prezidanto de la orienta federacio, aperis en la lasta bulteno de lia federacio, pro tio la mencio de « La informilo ». Kompreneble estas aliaj pli pozitivaj faktoj pri tiu vigla federacio. . Koncerne nian federacion kaj nian bultenon, ni ankaŭ « ne prenis eĉ unu falton ».

VIVO DE LA GRUPOJ

Béziers

La lasta kunveno antaŭ la somera disiĝo okazis la 13an de junio. Ni zorgis pri multaj aferoj kaj decidis pri la venontaj kunvenoj.

La Aleoj de Asocioj okazos sabaton la 12an de Septembro. Kiel ĉiujare, ni havos budon sur la promenejo kaj esperas vidi multajn gapantojn kaj precipe varbi novajn lernantojn.

Poste **ni kunvenos la 19an de septembro** por la unua kontakto kun novuloj kaj malnovuloj.

Monataj kunvenoj estas antaŭviditaj **la 10an de oktobro kaj la 14an de novembro**, ĉiam je 14h30 en Maison des Associations.

La staĝo en Agde bone disvolviĝis kun sufiĉe da partoprenantoj malgraŭ la proksimeco de la U.K. Multaj jam esperas partopreni la venontan staĝon, kiu verŝajne okazos **de la 2a ĝis la 9a de junio 1999** (ni antaŭrezervis la domon).

Pro diversaj malfacilaĵoj ne estis eble organizi komunan piknikon en junio ; ĝi okazos je alia momento...

Bonan someron al ĉiuj.

Interesa raporto, kiu mencias okazontaĵojn anticipe ! Imitinde ! Gratulojn al la aktiva grupo de Béziers

Montpellier

Ekspozicio en la urbodomo de Montpellier :

Laŭ propono de kelkaj membroj de la loka grupo aranĝi ekspozicion ie en la urbo okaze de UK por prezenti Esperanton al Montpellieranoj, Yvette Vierne vizitis responsulon de urba servo. Tiu-ĉi taksis tro modesta la peton kaj tuj proponis la ĉefan halon de la urbodomo kiel ekspoziciejon... kaj plie ne nur por kongreso-daŭro sed **dum 25 tagoj !**

Dum kelkaj monatoj oni arigis kaj ordigis amason da materialo, ricevitan de diversaj asocioj (lokaj, landaj, fakaj) kaj dank'al konsiloj de unuopuloj, teknika helpo de aliaj, prezentiĝos sufiĉe klara bildo de nia movado kaj eblecoj de nia lingvo.

Nun restas du gravaj punktoj :

-la 16an de julio je la 18a horo la urbestro inaŭguros kaj honortrinkigos nin pro tiu ekspozicio. Ni amase partoprenu !

-**de la 15a de julio ĝis la 8a de aŭgusto** necesos deĵori laŭvice duontagon. Kiuj pretas tion fari, tiuj sin tuj proponu al Yvette Vierne 04 67 54 15 43.

Artikolo ricevita dek tagojn antaŭ la evento (honorvino) ! Feliĉe restos tempo ĝis la 8a de Aŭgusto por viziti la ekspozicion kaj eventuale sin proponi por deĵori .Ni esperas, ke multaj Montpellieranoj informiĝos pri esperanto.

Perpignan

La lastan semajnon de julio nia grupo akceptos **S-ron Harukuni EGAWA** kaj lian edzinon Kimie, survoje al la U.K. de Montpellier. Ili loĝas en **WAKAYAMA, japana urbego ĝemeligita kun Perpignan.**

De 1993 Sro Egawa estas nia korespondanto, al kiu ni sendis plurajn artikolojn, ofte ilustritajn, pri katalunaj kutimoj kaj festoj. Tiujn artikolojn, japane altradukitajn, li aperigis en loka ĵurnalo.

Sro Egawa prezentos en esperanto diapozitivojn pri sia regiono, tipajn dancojn kaj kantojn. Tiu prezentado okazos en **salono Arago la 28an de julio je la 21a horo** kun samtempa detradukado. Ni esperas, ke ĉeestos sufiĉe multaj neesperantistoj, kiuj konkrete konstatos la taŭgecon de nia lingvo.

La escepta vizito de multaj eksterlandanoj al nia regiono estas bonega okazo por iom brui pri esperanto. Ni ne forgesu uzi la novan afiŝon (vidu p.2) kaj raportu en la gazetaro !

Federacia Kunveno

Ĉijare ne okazis federacia kongreso, ĉar la aktivaj esperantistoj estis okupataj por la preparado de la Universala kongreso. Kiel interkonsentite kaj pli frue menciite, federacia kunveno okazos aŭtune, kiam ni konos la datojn de la diversaj aranĝoj (speciale forumoj de asocioj). Tiam la homoj estos denove viglaj post plursemajna ripozo kaj pretaj rikolti la fruktojn de nova etapo. Novaj ideoj, novaj homoj estas bezonataj por pluvivigi nian federacion. La venonta SFS en Septembro anoncos al vi la daton de tiu escepta kunveno, kie ni restrukturigos nian asocion.

Réinsertion et Espéranto

Le 29 Mai, à l'initiative de Madeline Vidal du Cercle Biterrois pour l'espéranto (CBE), a eu lieu à Pézenas une nouvelle fois la conférence : « L'Europe, mais avec quelle langue ? » donnée par Thierry Saladin.

Malgré les efforts de Madeleine il n'y eut que trois personnes, hormis les dix espérantistes du CBE présents ce soir-là...

Le mercredi 17 juin à Montpellier une présentation de l'espéranto n'obtint la présence que de cinq personnes, dont trois élèves de « Réinsertion et Espéranto ». Un tract avait été distribué à 800 exemplaires la veille dans la rue et dans les cabinets de gynécologie...

La seule dame présente tenait dans la main l'autre version plus classique du tract, distribuée à 400 exemplaires (médiathèque, Maisons pour tous...).

Il y a du travail à faire... néanmoins les choses semblent bouger un peu car des contacts pris avec des chefs d'établissements scolaires de Pézenas, Agde et Béziers permettent d'entrevoir une possibilité de présentation de la Langue Internationale l'année prochaine.

De plus le parti des Verts, contacté à plusieurs reprises par l'association depuis mars 98, nous a proposé d'animer l'atelier d'Espéranto lors des journées régionales à Barjac les 4 et 5 juillet. Cet atelier sera animé avec M. Pierre Garcin, un des trois auditeurs de Pézenas, internaute, convaincu de la nécessité d'une langue neutre sur le « Web ».

Ni semu konstante... sed ni ne uzu niajn fortojn vane ! Bonan kuraĝon al « R. E° » !

4^{ème} rencontre « Terglob-Amantoj » les 20 et 21 juin 1998.

Nous nous sommes retrouvés 27 Espérantistes dont 5 enfants, à la rencontre des « Terglob-Amantoj » (les Amoureux de la Terre) à THINES.

THINES est une toute petite commune d'une centaine d'habitants. Le village est situé sur un promontoire, face à la vallée, dans une zone montagneuse sauvage et belle, près des VANS, en ARDECHE ;

La réunion a été fort sympathique grâce à l'accueil d'Ana et de Ljo.

Samedi matin, nous avons visité le village d'une vingtaine de bâtiments dont l'église romane remarquable et le monument à la Résistance, sculpté dans un mur.

Samedi après-midi, une projection de diapositives sur Hiroshima, nous a fait réfléchir sur la barbarie humaine et la nécessité d'agir pour sauver notre Terre. Une association japonaise s'est créée pour demander l'interdiction totale de la fabrication et de l'usage des engins nucléaires (Institut Hiroshima-Nagasaki). Une pétition a été signée.

Ensuite, nous avons suivi un chemin de randonnée durant quelques heures, admirant le paysage et les plantes.

Le soir, nous avons vu aussi des diapositives au sujet d'un voyage d'Espérantistes sur les polders de Hollande.

Dimanche matin, nous avons herborisé dans des sentiers sauvages qui nous ont conduits jusqu'au lieu du pique-nique, au bord d'un torrent, dans une belle petite propriété aimablement mise à notre disposition.

En fin d'après-midi, nous avons vu en vidéo, un dessin animé japonais : «L'Oiseau-Bonheur » qui présente, pour les enfants, l'horreur d'Hiroshima.

Samedi après-midi et dimanche matin, Ana a animé des cours d'Espéranto pour débutants.

Nous avons passé deux agréables journées ensoleillées et tout le monde a parlé presque tout le temps en Espéranto grâce à la présence de Ljo, Japonais .

Pour la 5^{ème} Rencontre, l'an prochain, écrivez à :

ESPERANTO LAFIGERE 07140 MALARCE tél. 04 75 39 99 79

La fédération a acquis le panneau électronique réalisé par Arie Bouman. Ce système donne une première idée de l'espéranto de façon ludique et convient parfaitement pour une présentation en plein air, lors des foires des associations par exemple. Il est à la disposition des espérantistes intéressés qui en feront la demande en temps voulu.

Montpellier

Kelkaj miloj da homoj eksterlande prononcas tiun nomon ĉiutage kaj preparas sin por la vojaĝo al la 83a UK.

Vi trovos ĉi-poste du tekstojn pri Montpellier.

La unua estas el sespaĝa broŝureto nun presata kaj donacota de la federacio al la 3000 kongresanoj, titolita : « Sugestoj por individua vizito de Montpellier kaj regiono ».

La dua aperis en la februara numero de « Esperanto ».inter pluraj artikoloj pri la temo « nia kongreslando ».

ANTAŬPAROLE AL LA VIZITO.

A Kontraste kun najbaraj urboj : Nîmes, Arles, Marseille, kiuj datiĝas de antikva epoko, Montpellier (prononcu monpelje) estas nur miljara (la unua dokumento pri ĝi datiĝas de 985). Cetere ĝi konsistis el du vilaĝetoj : unu apartenis al nobela familio Guilhem, dum la dua dependis de episkopejo Maguelonne (apud la maro).

B En 1204 Guilhem-ino, Marie de Montpellier, edziniĝis kun la hispana Petro de Aragono, el kio rezultis, ke unu parto fariĝis hispana, dum la dua estis franca. Tio ĝis 1349, post kiam la franca reĝo reakiris la hispanan posedaĵon kontraŭ 120 000 eskudoj.

C Dank'al ĝia haveno « Port Juvénal » prosperis komerco kun Oriento (spicoj, tinkturoj...). Samtempe disfamiĝis la kompetenteco de plant-fakuloj, kiuj bone konis la kuracpovon de plantoj. Tio altiris jen studentojn, jen medicinistojn. Kaj en 1289, per buleo de Papo Nicolas IV, sankcie estis kreita la « Montpelliera Medicina Fakultato », unu el la plej malnovaj en la mondo. En ĝi kuracistiĝis Rabelais (1530). Pli poste estis kreita en 1593 la « Botanika Ĝardeno ».

D Montpellier suferis ĉiujn plagojn mezepokajn : peston, mizeron, malsategon...

E Elstara nomo, meze de la 15a jarcento estas tiu de Jacques Cœur, riĉega negocisto kaj financa superintendantato de la reĝo Charles VII.

F Dum la dekseca jarcento Reformacio enkondukiĝis en Montpellier. Furiozis la batalo inter Katolikoj kaj Protestantoj. Preĝejoj, monaĥejoj estis detruitaj multnombre. Katolika reĝo Louis XIII (Ludoviko la dektria) sieĝis la protestantan urbon, kiu kapitulaciis post tri monatoj. La plimulto el la protestantoj fuĝis eksterlanden. Konstruo de citadelo firmigis la potencon de la ŝtato super la urbo.

G Louis XIV (Ludoviko la dekkvara) igis Montpellier ĉefurbo de Regiono Bas-Languedoc (malalta Langvedoko). Altranguloj, impost-kolektistoj, ĉiuspecaj funkciuloj konstruigis por si luksajn domojn, nomitajn « hoteloj ». La urbo transformiĝis dank'al arkitektoj d'Aviler kaj Giral.

Akvedukto provizis la urbon per pura akvo. Bela kaj originala grekstila konstruo ornamas la akvo-rezervujon. La placo sur kiu ĝi staras, same kiel la rajd-statuo de Louis XIV nomiĝas « Le Peyrou » (pr : l'peru). De tie la panoramo estas belega.

H Pasis la jaroj. En 1839 estis konstruita unu el la unuaj fervojoj, inter Sète kaj Montpellier. Ĝi faciligis negocon, precipe tiun de vino. De tiam datiĝas la preskaŭ ekskluziva kulturo de vito en la regiono.

J En 1930 la loĝantaro atingis 70 000 homojn, en 1990 : 220 000, kaj 300 000 se oni konsideras la satelitajn urbetojn. Kiel en multaj grandaj urboj multiĝis diversaj entreprenoj industriaj aŭ komerc-celaj.

K En la urbo mem estas nepre vizitinda la nova kvartalo Antigone.

Montpellier estas la ĉefurbo de Regiono « Languedoc-Roussillon » (Langvedoko-Rusiljono).

NB - « Languedoc » signifas regionon, kie oni parolas/is la lingvon OC, la lingvon de Okcitanio

- Ni notu la ekziston de trilingva vortaro « Diccioniari de mila mots occitan-catalan-esperanto » de Jacme Taupiac.

La majuskloj komence de paraĝrafoj estas referencoj en la tekstoj, kiuj sekvas.

Post la 83a UK en Montpellier, la 84a en Berlino, Germanio (31 julio – 7 aŭgusto 1999)

Aliĝiloj estas jam pretaj. La kongreskotizoj en FF ne estas ankoraŭ konataj, jen ili **en guldencoj** (laŭ la aliĝilo) 4 kategorioj : 1 : ne individua membro de UEA, 2 : individua membro, 3 : kunulo/junulo/handikapulo ne membro de UEA, 4 : kiel 3 sed individua membro de UEA

Ĝis la fino de septembro : 1: 295, 2:235, 3:180, 4: 118

Ĝis la fino de decembro : 370 295 225 150

Ĝis la fino de marto : 445 350 270 175

Poste 520 410 315 205


Se vi intencas partopreni kaj volas ŝpari...

Montpeliero montras multajn facetojn

La suda parto de Francio estas riĉa je antikvaj memoraĵoj el la epoko de grekoj kaj romianoj. Kvankam Montpeliero naskiĝis multe pli malfrue, en la jaro 985, ne malpli abundas en ĝi vidindaĵoj. Per teksto kaj fotoj gvidas nin Jeannine Bony.

Se plaĉas al vi la mezepoka faceto de la urbo, promenu sur la bulvaroj: la "ŝildo" desegnata de ilia linio signalas la iamajn remparojn. Postrestas kelkaj pordegoj aŭ turoj: jen turo de la Babote (foto 1), kies bazo datiĝas de la 13-a jarcento. Sine de la "ŝildo", ĝuu la ombrojn de la mallarĝaj stratetoj, laŭiru la deklivojn de la urbaj montetoj, levu la kapon por malkovri malnovajn nomojn de la stratoj, inkrustaĵojn de romanikaj aŭ gotikaj arkoj en domoj pli modernaj, statuetojn de sanktuloj en siaj niĉoj...

Ni haltu antaŭ la fasado de la Medicina Fakultato kaj gotika antaŭpordo de la Katedralo, restaŭritaj (foto 2).




1. Turo de la Babote

La konstruaĵo datiĝas de la 14-a jarcento, sed la Medicina Fakultato famigis Montpelieron jam jarcenton pli frue. Por faciligi la laboron de ĝiaj studentoj, estis kreita la Botanika Ĝardeno en 1593, la plej malnova en Francio.

Post la mezepokaj plagoj de pesto kaj malsatego, post la dramo de la religiaj militoj, komenciĝis la elstara epoko de la 17-a kaj 18-a jarcentoj. La reĝo Ludoviko la 14-a igis Montpelieron ĉefurbo de la regiono Langvedoko.

Montpeliero riĉiĝis kaj beligiĝis. Jen, inter diversaj aliaj konstruaĵoj, privataj palacetoj de altranguloj, kies lignajn pordojn (foto 3) vi devos puŝi por malkovri la kaŝitajn fasadojn (foto 4).

Jen pli larĝaj spacoj:



2. Medicina Fakultato kaj antaŭpordo de la Katedralo

- Promenejo Le Peyrou, sufiĉe alt-situa por ĝui belegan panoramon. Admiru ankaŭ tiun elegantan grekstilajn konstruaĵojn kiu kaŝas la akvorezervujon provizitan per akvedukto
- Placo de la Komedio, kromnomita "ovo" (foto 6), kaj promenejo l' Esplanade.

Post la konstruaĵoj kiuj staras ĉe flanko de tiuj du lastaj promenejoj, ni forlasas la klasikan periodon de la 17-a kaj 18-a jarcentoj.


La tri Gracioj de la fontano sur la placo de la Komedio apud la Operejo de la 19-a jarcento (foto 6), similan al la Pariza operejo Garnier, servinta kiel ĝia modelo.

Tra la freŝdataj fontanoj de la Esplanado videblas nia kongresejo Le Corum, inaŭgurita en 1988.

Kun ĝi, aperas la lasta faceto de Montpeliero: ekster la "ŝildo" pli kaj pli disvolviĝas moderna urbo: la komerca Polygone, Antigone (vidu la kovrilon), kvartaloj konceptitaj de la kataluna arkitekto Ricardo Bofill, kaj baldaŭ la haveno Marianne, kiu kunligos la urbon kaj la maron.

Ĉiu el tiuj vizaĝoj de Montpeliero atendas vin.

Jeannine Bony (Francio)



6. Placo de la Komedio

83a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
MONTPELLIER, 1 - 8. 8. 1998



*koloraj poŝtkartoj eldonitaj de
Editions Méridionales / St jean de Védas
okaze de la Universala Kongreso de Esperanto*

KONGRESURBO 1998 MONTPELLIER






Kongresejo LE CORUM






Montpellier


83-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO 1998



*koloraj poŝtkartoj eldonitaj de
Editions Méridionales / St jean de Védas
okaze de la Universala Kongreso de Esperanto*



CAMARGUE



AIGUES-MORTES


MONTPELLIER 1998




LE GRAU DU ROI

PORT-CAMARGUE


SALUTON EL LA KONGRESO SUB MEDITERANEA SUNO




CARNON-PLAGE



LA GRANDE-MOTTE




PALAVAS LES FLOTS



MONTPELLIER

01 - 08
aŭgusto
1998



83-a Universala Kongreso
de Esperanto

Nos hommes politiques et l'espéranto (suite)

M. Allègre, déjà cité dans notre précédent bulletin, a indiqué dernièrement, dans le cadre de son projet de réforme des programmes de lycée, que chaque lycéen devrait (sic) parler deux ou trois langues. Nous attendons avec curiosité de connaître les moyens qu'il compte mettre en œuvre pour arriver à ce résultat. Ci-dessous la réponse du même à un ancien ministre de l'éducation nationale sur l'espéranto (Journal Officiel n° 11 du 16 Mars 98). Dommage que M. Lang ne se soit pas penché sur la question plus tôt !

Quand Jack LANG, à son tour, se laisse abuser !

JOURNAL OFFICIEL (n°11 – lundi 16 mars 1998)

Assemblée Nationale – Débats parlementaires
réponses aux questions écrites

*Enseignement
(programmes- espéranto)*

7031 – 1er décembre 1997 – M. Jack LANG appelle l'attention de M. le ministre de l'éducation nationale, de la recherche et de la technologie sur la promotion de l'espéranto, langue à portée universelle, dans les établissements scolaires français. Compte tenu de son développement dans bon nombre de pays de l'Union Européenne et dans le cadre de l'élargissement futur de la Communauté, il souhaite savoir les mesures que prendrait le Gouvernement pour favoriser son expansion en tant que langue auxiliaire de communication.

Réponse – Le développement de la connaissance et de la maîtrise des langues vivantes constitue une des priorités constantes du ministère de l'éducation nationale, de la recherche et de la technologie. En l'état actuel des choses, l'organisation du collège prévoit l'introduction progressive de deux langues vivantes. L'étude d'une langue vivante étrangère est obligatoire en classe de sixième. L'enseignement d'une deuxième langue vivante débute en quatrième et y sera assuré pour tous les élèves à partir de la rentrée scolaire 1998. Avec douze langues offertes au choix des élèves au collège – anglais, allemand, espagnol, italien, russe, portugais, arabe littéral, hébreu moderne, chinois, japonais, néerlandais, polonais -, auxquelles s'ajoutent pour le lycée le danois, le grec moderne et le turc, le système éducatif français est l'un de ceux qui, en Europe et dans le reste du monde, proposent aux familles le choix le plus ouvert, et il paraît peu justifié d'en accroître encore la diversité. Par ailleurs, l'absence de support littéraire, historique ou géographique comparables à ceux d'une langue classique ou vernaculaire n'a pas permis de retenir l'espéranto au nombre des langues susceptibles d'être présentées aux examens. Pour ces motifs il ne paraît pas opportun de donner une suite favorable à la proposition de loi n°96-485 du Sénat relative à l'enseignement de l'espéranto. Cette proposition n'exclut en aucune manière la possibilité laissée aux établissements scolaires d'organiser, sur leurs moyens propres et dans le cadre d'activités complémentaires, une initiation à l'espéranto.

Staĝoj

Ni erare anoncis en la lastaj numeroj de SFS staĝojn, kiuj ne okazis kaj ne okazos. La ĥorstaĝo en Ariège anoncita inter la 14a kaj 21a de februaro estas fakte prokrastita ĝis la fino de oktobro (de la 25a de oktobro ĝis la 1a de novembro), samloke, samtarife kaj kun la sama ĥorestrino Zdravka Bojčeva el Bulgario.

Informas Jorgos 0561608683 aŭ SFS. Unu semajnon antaŭ tiu staĝo, sabaton la 17an de oktobro, oni inaŭguros en Montbel apud Montségur straton nomotan « Rue de l'Espéranto » Sendu gratulmesaĝojn en esperanto aŭ la franca lingvo al la urbestro (M. le Maire, Hôtel de ville 09600 Montbel).

Grésillon ne funkcios ĉi-somere. Malgraŭ modifoj pro sekureco (kiuj jam kostis kvarcentmil Frankojn) la servoj de la subprefektejo ne konsentis pri la remalfermo de la E^e-domo.

Internaciaj semajnoj

La lasta SFS informis detale pri la 24a semajno en Sète (de sabato la 29a de Aŭgusto posttag-meze ĝis sabato la 5a de septembro). Al la jam anoncitaj instruistoj Pierre Babin (3a grado) kaj Atilio Orellana Rojas (1a grado per Cseh-metodo) aldoniĝas Marjo Guzzi (paroliga kurso).

En oktobro (de la 3a ĝis la 10a) estas anoncita la 6a semajno pri kulturo kaj turismo en Calafell (provinco de Tarragona), Katalunio. Aliĝo : 3500 pesetoj, unutaga tarifo kun manĝoj 4200 pesetoj (en dulita ĉambro), 5000 (en unulita ĉambro –dustela hotelo). Informas : Hispana fervojista E^o-asocio, apartado 15027, 08080 Barcelono.

La angla ĵurnalo "The Independent" publikigis la rezultaton de esploro de "Lingva Observatorio" el Skotlando, ke oni parolas sur la Tero 10.000 lingvojn. La dialektoj estis kalkulitaj en ĉi tiu tutaĵo. La longa listo, kiu ricevis la nomon "Babela Biblio", estos transdonita al UNESKO, kiel kontribuo el Britio por la granda mapo de la mondaj lingvoj ellaboritaj kun la modernaj rimedoj de

Informadiko en la jaro 2001. Laŭ la listo unu miliardo kaj 100 milionoj da homoj parolas la ĉinan lingvon; 470 milionoj parolas la anglan lingvon; 418 milionoj, la hisdustanan; 372 milionoj, la hispanan. La franca kaj germana lingvoj, parolataj respektive de 124 milionoj kaj 121 milionoj da homoj, okupas la 10-an kaj 11-an vicajn. La angla lingvo eble estas parolata de pli da uzantoj, se oni

kalkulos la tuton de la loĝantoj de la landoj, kiuj ĝin deklaris oficiala lingvo.

Ĉi tiujn informojn publikigis la revuo "Esperanto Aktuell", de Germana Esperanto-Asocio (Immentalstr. 3, 79104 Freiburg, Germanio), kun noto pri tio, ke Esperanto estas instrumento por interkompreno kaj interkomuniko, ĉiam pli grava kaj uzata inter la popoloj.

Konkludo de prelego de Claude Piron (El « Heroldo »)

Faktoj estas pli obstinaj ol paroloj

Vi vidas, ke la psikologiaj aspektoj de Eo, kaj de la monda lingvoproblemo, estas multe pli kompleksaj ol oni unuavide imagus. En la psiko de la plej multaj individuoj troviĝas terura rezisto al la ideo mem de lingvo internacia. Pro tiu rezisto, preskaŭ neniu en la politika, socia kaj intelekta elito akceptas serene esplori la aferon. Kaj tamen ĝi progresos. Similaj kazoj de rezisto al io pli bona, pli oportuna, pli demokratia abundas en la historio. Plej tipa ekzemplo estas la rezisto en Eŭropo, kontraŭ la ciferoj, kiujn ni nun uzas, la hindaj / arabaj ciferoj; ankaŭ ilin la intelekta elito (kaj ne nur ĝi) sentis sakrilegio kontraŭ la romiaj ciferoj ĝis tiam uzataj.

Mi estas konvinkita, ke Eo estos ĝenerale akceptita iam. La patologio ne eterne estos pli forta ol la kuracaj fortoj, ankaŭ kiuj agas en la socio. Inter tiuj kuracaj fortoj estas la pli kaj pli bona kompreno de la fenomeno Eo fare de lingvistoj, ekzemple, kaj de multaj aliaj personoj.

Estas ankaŭ la postuloj de la realo. Kiel diris Lincoln, oni povas kaŝi la veron al parto de la publiko dum parto de la tempo. Oni ne povas kaŝi la veron al la tuta publiko dum la tuta tempo. Eo, se oni komparas ĝin al ĉiuj aliaj rimedoj intergentaj komuniki, estas objektive la plej bona, per tre granda distanco, por ĉiuj kriterioj.

Faktoj estas pli obstinaj ol ideoj. La rezisto plu daŭros kaj estos akra, jes ja, certe, ĉar oni povas percepti ion nur kiam oni estas tiurilate preta, tiel ke, nuntempe, multaj homoj simple ne aŭdas, kion vi diras pri Eo: ilia menso ne estas preta, do viaj frazoj preterpasas sen penetri ĝin. Jes, la rezisto plu estos forta. Sed, kredis min, ĝi ne povos superi. La faktoj venkos. Vero venkos. Esperanto venkos.

Claude Piron

Prelego prezentita en Bazelo (Svislando) dum la Trilanda Renkontigo la 21^a de marto 1998.

LA ANGLA KOMPLETE VENKAS EN EU

Laŭ nova studaĵo, kiu konatiĝis meze de januaro 1998, en instancoj kaj servoj de Eŭropa Unio (EU) nun klare la unuan rangon de uzataj lingvoj tenas la angla, kiu forpuŝis de tiu loko la francan. La germana, plej granda lingvo ene de EU, draste falis sur la skalo, aliaj eŭropaj lingvoj ludas preskaŭ nulan rolon.

Oni analizis proksimume unu miliardon da dokumentaj paĝoj, kiujn tradukis la lingvoservo de EU-komisiono dum la pasintaj du jaroj. La rezulto estas: 42 elcentoj de tekstoj tradukitaj en aliajn lingvojn de EU (en kiu ja laŭkontrakte ĉiuj havas egalan rajton) venis el anglaj originaloj, 40 elcentoj el francaj originaloj, nur 6 elcentoj el la germana kaj nur 3 el hispana aŭ itala. Tio do signifas, ke plimulto de dokumentoj estas verkita originale en la angla lingvo.

Dum multaj jardekoj, post la fondo de la unua eŭropa komunumo, tiu pri karbo kaj ŝtalo en 1951, kaj en posta Eŭropa Ekonomia Komunumo (fondita en 1957) la franca lingvo tenis tute klare la unuan rangon en ĉiuj komunaj instancoj kaj servoj. Eĉ post aliĝo de Britio en 1972 la franca restis la plej grava lingvo. Sed tio nun evidente pasis.

EU-korespondantoj, kiuj raportis pri la menciita nova analizo, atentigas krome ke jam delonge ankaŭ en interparoloj de ministroj, oficistoj kaj parlamentanoj de EU oni uzas preskaŭ nur la anglan, kiun scias ĉiuj; la germanan, ekzemple, regas preskaŭ neniu brito, franco kaj sud-eŭropano.

Laŭ la raportoj, konkretiĝas ankaŭ onidiroj, ke la franca registaro - pro la evidenta venko de la angla - volas ŝanĝi sian lingvopolitikon kaj

INTERESE

enkonduki en mezlernejoj kiel unuan fremdan lingvon por ĉiuj la anglan.


Nun lernantoj povas elekti ekzemple ankaŭ la germanan kiel unuan fremdlingvon, sed tion faras nur ĉ. 10 %-oj. La germana lingvo en Francio anstataŭis la iamajn elitismajn lingvojn, la antikvajn latinan kaj grekan. Laŭ analizoj, la germanan elektas la plej bonaj francaj lernantoj.

Inverse, ankaŭ en Germanio (eĉ en regionoj najbaraj de Francio) nur ega malplimulto da lernantoj elektas la francan kiel unuan fremdan lingvon, ĉiuj aliaj la anglan.

Kelkajn semajnojn antaŭe, opinisonda instituto Gallup enketis en 8 EU-ŝtatoj pri enkonduko de ununura oficiala lingvo de EU. La rezulto estis, ke 47 elcentoj kontraŭis la ideon, 48 estis por. Demandite, kiun lingvon oni preferus, se oni devus elekti oficialan lingvon, 86 elcentoj indikis la anglan, 65 elcentoj la francan, 47 la germanan, 30 elcentoj la hispanan kaj 21 elcentoj la italan.

En 4 landoj plimulto pledis por ununura oficiala lingvo: Italio (70 %), Belgio (54 %), Hispanio (53 %) kaj Nederlando (51 %). En la aliaj 4 landoj oni plimulte kontraŭas tian solvon: Francio (51 % kontraŭ), Germanio (52), Luksemburgio (54) kaj - oni miru! - plej forte Britio (65 %). 64 elcentoj de ĉiuj enketitoj diris, ke enkondukon de ununura oficiala lingvo oni devus decidi per referendumo.

Stefan Maul
el ret-info



HUMURO

**Anekdotoj el
«La Informilo»**

Kliento eniras kukovendejon kaj demandas:

"Mi dezirus lotihuiagijslitruxtom-kukon parfumita je vanilino...
- Je kia parfumo la lotihuiagijslitruxtom?... Mi ne bone komprenis!"

Sablero proponas al amiko:
"Ĉu vi konsentus akompani min por migradi dum la feritempo?
- Konsentite!.. respondas la alia sablero.

Ambaŭ eniras la Saharo-dezerton kaj kviete promenadas. Subite la invitito okulumas malantaŭen kaj duonlaŭte diras:
"Hum!... Mi havas la impreson, ke oni sekvas nin!..."

Maljuna riĉulo kuŝas sur sia lito en hospitalo. Li vere malfacile spiras. Lia nevo apudstaras.

"Onklo Karlo, kion mi povus fari por mildigi viajn suferojn? Nur diru...
La malsanulo pli kaj pli sufokiĝas kaj provas brakgestumi..."

"Onklo Karlo, nepre diru!.. Kion...
La onklo finfine sukcesas balbuti:
"Forigu vian piedon, kiu premas la okigentubon!..."

En iu urbeto okazas futbalmaĉo. Iu spektanto ĵus sidiĝis kun hundo ĉe liaj piedoj. La besto atente observas la eventon...

"Ĉu vere ĝi ŝatas tion?... demandas najbaro.

- Absolute! Ĝi ĉeestas ĉiun maĉon...
- Ĉu vi kredas, ke ĝi komprenas?
- Tutcerte! Ĉiufoje, kiam la golulo de nia teamo ne kapablas haltigi la pilkon, ĝi bojegas proteste...

- Nekredeble! Kaj kiam via teamo sukcesas golon, kiel ĝi reagas?
- Mi ne scias... Tiun hundon mi posedas nur de kvar jaroj..."

AFORISMOJ

Esperantigitaj de Bertil Englund

Kio estas idealŝtato? Tio estas ŝtato kie maljustaĵo kontraŭ la plej malsignifa civitano estas konsiderata kiel maljustaĵo kontraŭ ĉiuj.

Solon

Ah, nur idioto planas hodiaŭ kion li faru morgaŭ. La morgaŭa tago ne apartenas al vi antaŭ ol ĝi feliĉe pasis.

Sofokles

Se ĉiuj homoj estus justemaj, neniu havus bezonon esti brava.

Agessalus II

La posteularo plej fidinde atestas pri la vero.

Pindaros

La demando estas la komenco de ĉia scio.

Theaitetos

Kiel oni riĉiĝu? Malriĉiĝu je deziroj!

Aristoteles

La saĝulo lernas pli multe de la idioto ol la idioto de la saĝulo.

Cato pli aĝa

La homo naskiĝis por du aferoj: pensi kaj agi.

Cicero

Nenio estas pli stulta ol stulta rido.

Catullus

La jaroj forbalaas ĉion, eĉ la prudenton.

Vergilius

Forto sen saĝeco falas per sia propra pezo.

Horatius

Ĉiu povas certigi al si sian propran feliĉon se li lernos serĉi ĝin ne ekster sed en si mem.

Seneca

La plej bona maniero venĝi estas, ne simili tiujn kiuj faris al ni la malbonon.

Marcus Aurelius

La envio estas ĉevalo sur kiu la diablo volonte ridas.

J. Krystomos

Diri ion unu fojon kaj je tio resti estas pli bone ol paroli cent fojojn.

Gustaf Vasa

Kiam homo sin mem akuzas, oni kredas lin, sed neniam kiam li sin laŭdas. Ĉiuj Grandaj pensoj venas el la koro.

M. de Montaigne

INTERESE

La timo havas multajn okulojn.

M. Cervantes

Same koncerne monon kiel sterkon: ili ne utilas se ili ne disdoniĝas.

F. Bacon

Vera kuraĝo estas ke oni sen atestantoj povas fari tion kion oni povus fari antaŭ ĉies okuloj.

F. de la Rochefoucauld

Mi pensas, do mi estas.

R. Descartes

La koro havas motivojn kiujn la prudento ne komprenas.

J. B. de Bossuet

Kvintesenco. La fina demando super ĉio: Kio estas la homo en la naturo?



Nenio kompare al la eterno sed ĉio kompare al nenio. Io inter

nenio kaj ĉio. Pro la fakto ke li estas senfine fore por povi kompreni la ekstremojn, la fincelo kaj la komenco de ĉio estas kaŝita por li en ia nepenetrebla sekreto. Li estas same malkapabla vidi la malplenon el kio li ekestis kiel la senfinajon en kio li estos englutata.

B. Pascal

Por homo troviĝas nur tri grandaj eventoj: naskiĝi, vivi kaj morti. Li ne memoras la naskiĝon, li timas morti kaj forgesas vere vivi.

J. de la Bruyère

Ĉiu volas longe vivi, sed neniu volas maljuniĝi.

J. Swift

Nenio estas tro malgranda por tia eta estaĵo kia la homo.

S. Johnson

Amu la veron sed pardonu la eraron. Ne la amo estas blinda sed la sinamo. Filozofo sen sincereco estas nur politikisto.

Voltaire

Pacienco estas la arto povi esperi.

L. de Vauvenargues

La unuaj kvardek jaroj de nia vivo liveras al ni la tekston, la resto la komenton.

Schopenhauer

el La Kancerkliniko, 83, jul.-sep. 1997

DISTRA PAĜO

Somere varmas kaj vi ne havas sufiĉe da energio por la kutimaj krukvortoj, aŭ vi estas okupata pro la VK kaj ne havas sufiĉe da tempo por serĉi... pro tio ĜOPARO proponas al vi tre simplan ludon, kiu prenos de vi nur kelkajn minutojn.

Liter-ŝtuparo :


TAPIĜETO																			
	S	A	N	A															
O																			
T																			
K																			
R																			
A																			
B																			

- 1) Enmiksi unu post la alia ĉiun el la ses literoj proponitaj (tapiĝeto) en la komencan vorton por verki novajn vortojn ĝis la fina deklitera. Pluraj solvoj eblaj...
- 2) Por mildigi la kapdolorojn, returnu por legi helpilojn (nur post sufiĉa unua cerbumado !)

1)Birdo 2)Demono 3)Itala
4)Malvano 5)Felo 6)Instrumenta

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	Ĉ	A	R	P	E	N	T	I	S	T
II	A	P	O	S	T	A	T		I	R
III	T	O	S	O		R	U	A	N	A
IV	O	S	T	R	O	G	O	T	O	J
V	B	T		I	R	I		O	P	E
VI	R	E	T	A	B	L		M	L	K
VII	I	R	I	Z		E	K	I		T
VIII	A	I	R		K		A	G	L	O
IX	N	O	K	T	U	R	N		E	R
X	D	R	A	M	A	T	U	R	G	I

Solvoj de la 144-a



SFS deziras al siaj legantoj agrablajn somerferiojn kaj rendezuvas fine de septembro. Kontribuoj estos bonvenaj ĝis la fino de septembro.
SFS ĉe Jean Hélin
Beauregard - Rte de Montcayroux
48500 La Canourgue
Tel/faks : 04 66 32 86 36